# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (893) • 2012 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



Ĥorejo de la evangelia preĝejo en Trento. Fotis Karl Heinz Schaeffer

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Vortoj aŭtentaj | 27 |
| Pardonu Dion! | 29 |
| Splito el saĝo kaj klero | 34 |
| Bibliaj tagoj 2012 en Trento | 35 |
| Henk de Hoog - Andreo Cseh 4 | 38 |
| Kristanaj sektoj multnaskiĝas en Kongo | 40 |
| Rememoroj al la kongreso 2011 | 42 |
| La tuniko en Treviro, Vizitebleco | 43 |
| Esperantaj jubileoj en Speyer | 44 |
| Gratulojn al nia 80-jarulino | 45 |
| Informetoj | 46 |
| Nekrologo Helmut Rössler | 47 |
| Gloro al Dio en la altoj | 48 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Dum la pasko ni denove aŭdis la konatajn versiklojn el la Evangelioj. Mi aŭdis iun demandi la pastoron, kiel ŝi kapablas ĉiujare prediki ion novan pri la sama evento. Bedaŭrinde mi ne aŭdis la respondon, sed la demando restis en miaj oreloj.

Laŭ mi, eblas pritrakti la biblian tekston almenaŭ el du diversaj vidpunktoj: 1) profunde rigardi la tekston kaj ĝian situacion kiam diritaj/verkitaj por pli bona kompreno, aŭ 2) uzi la tekston kiel bazo por kompreni sin mem en la nuna mondo, siajn agojn kaj sian rilaton al ĝi. Tiujn du diversajn elirpunktojn ni renkontos en la du unuaj ĉi-numeraj artikoloj.

Cetere vi trovos ĉi-numere "printempan florbukedon" de diverstemaj kontribuoj. Mi multe ĝojas kaj dankas ĉiun kontribuanton.

# Vortoj aŭtentaj

Armando ZECCHIN, IT

***Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras.***

Tiuj vortoj estas eldiritaj de Jesuo sur kruco (Luk 23,34). Ĉu vere li ilin diris?

La invitita bibliisto, urĝita de demandanto certe pli informita ol la ceteraj, respondis kaj... perturbis la aŭskultantaron. Li ekstartis tiel:

> *"Du gravaj problemoj ĉirkaŭas tiun jesuan diron. La unua koncernas ĝian signifon, kaj la dua, eĉ pli grava, koncernas ĝian aŭtenton, ĉar ĝi mankas en kelke da tradiciaj manuskriptoj. Ni preterlasu la unuan. Pri la dua: laŭ la plej insista koncepto, fidindita ĉe multaj komentistoj (ankaŭ ĉe Nestle-Aland kun Tischendorf, editoroj de iuj el la kritikaj eldonoj de la greka Nova Testamento kiuj tamen en iliaj oficialaj tekstoj registras la forigendan frazon), tiu pasaĵo estus estonta aldonaĵo. Kontraŭe, diversaj suspektas ke ĝi estis forigita el la manuskripta tradicio en kiu origine ĝi ĉeestis."*

Kie apogiĝas tiu dua opinio? Sur tiama maljusta interpreto pri la signifo de tiu pardono. Pardoni pensigas kulpulon kiu scie kaj vole plenumis krimon kaj kiu sincere pentas kaj pardonpetas. Ĉi-tie, male, Jesuo eksplicite asertas ke liaj krucumantoj neniel scias kion ili estas plenumantaj, do ili ne estas responsaj, aŭ tute responsaj, (pri tio jam rimarkigis prakristanaj verkistoj, inter ili Pseŭdo-Justino) kaj do nepardoneblaj.

Mem la verbo aphes (ἄφες, tiu αφίεμεν de la Patro Nia: preterlasu, indulgu – Mat 6,12) ŝajnas signifi "imputu eĉ ne kiel kulpo" ĉar ili opinias bono la malbonon kion ili faras". Jesuo petas de la Patro ke lia mortigo estu kalkulita senkulpa, ĉar ili ne scias kion ili faras. La tuta frazo ŝajnas forpreni moralan responson de liaj mortigantoj. Ĉu tio akordiĝis kun la akrega emo kulpigi la hebreojn pri la mortigo de Kristo? Eksceso de kulpigo kontraŭ hebreoj povus peli ke kopiistoj preterlasu la frazon por ke ilia "evidento" pri la kulpo de la hebreoj ne estu febligita se ne senbazigita. Ankaŭ apenaŭ konsenti kun la malpli kompromisa interpreto, laŭ kiu la "ekskuzanta" frazo estus nur singarda Luka eskapilo por ne malkomplezi la hebreajn aŭskultantaron kaj legantaron, disĝenus la firman konvinkon pri la hebrea kulpo.

Kromaj argumentoj helpas pri la


origina aŭtora starigo de la frazo: se ĝi malĉeestas en la papiruso P75 kaj en la kodeksoj Vatikana kaj Sinaja krom en siriakaj kaj koptaj bibliaj versioj, ĝi aperas en multaj aŭtoroj de la dua kaj tria jarcentoj kiel Markiono, Taciano, Hegesipo, Origeno, Sankta Ireneo, Klemento el Aleksandrio, Hipolito el Romo, Eŭsebio el Cezareo kaj plue en ĉiuj manuskriptoj de la "Vetus Latina (Malnova Latina versio) kaj de la Vulgato. Ĝia malĉeesto en unu manuskripto estas kompensata per la ĉeesto en aliaj samnombraj, kaj fine multaj preĝoj formulitaj de Patroj de la Eklezio reeĥas tiujn jesuajn vortojn.

Ke, plue, la frazo rajtas aŭtente troviĝi en tiu loko estas sugestata de similaj konceptoj elstarigitaj de la sama aŭtoro Luko en alia lia verko, la Agoj de la apostoloj. Oni vidu: Agoj 3,17, kie Petro parolas al la hebreoj de Jerusalemo (eble en 30 p.K.): Petro, kiel Jesuo en la citita sed forigenda diro, asertas ke la instigantoj de la morto de Jesuo ne sciis kion ili faras (la sama deklaro pri "nescio" troviĝas en aliaj paroladoj de Petro kaj Paŭlo kiel en Agoj 13,27: en ĉiuj tiuj pasaĵoj reeĥiĝas tio kion Jesuo diris laŭ Luko en 23,34. Petro eksplicite diras: "Kaj nun, fratoj (hebrea aŭskultantaro), mi scias, ke vi agis pro nescio, kiel ankaŭ viaj regantoj". Kaj Petro proklamas tion tuj post la deklaro: "kiun (Jesuon) vi transdonis, kaj malkonfesis antaŭ la vizaĝo de Pilato, kiam ĉi tiu decidis liberigi lin". Temas, do, pri la sama senkulpigo ofertita de Jesuo sur la kruco".

La oratoro strebis pensigi ke la eble forigenda frazo funde nenion ŝanĝas pri la Jesua Doktrino kaj akcentis: "Ankaŭ se, ekstreme dirate, la evangelia frazo ne elbuŝiĝis rekte el la lipoj de Jesuo, certe ĝi almenaŭ respondas al liaj sentoj, al la sentoj de tiu, kiu anoncis ke al la malamiko oni devas pardoni 'sepdek oble sep fojojn' (Mat 18,22)".

Per tiuj finaj vortoj la preleganto provis konsoli tiujn kiuj volus ke ĉio kio surfaciĝas el la evangelio (kaj ĝenerale el la Sanktaj Skriboj) estus vorto de Dio kaj ne nur, foje, Lia penso. Ĉu li sukcesis?

ଓ



Parto el Papiruso 75

# Pardonu Dion!

Adaptita de pastoro Adebayo Ola Afolaranmi, NIĜERIO

Ĉi tiu artikolo estas adaptita el la libro titolita *Forgive God!* (esperante: Pardonu Dion!) verkita de pastoro doktoro Fred Deegbe. Ĝi estas adaptita per la afabla permeso de la aŭtoro. (Ĉiuj tradukitaj citaĵoj estas el la libro.)

La titolo de ĉi tiu mesaĝo aspektas iel blasfema. Kiel oni pardonas Dion? La norma afero estas ke oni petu por la pardono de Dio. Tamen, Dio bezonas la pardonon de multaj homoj ĉar la travivoj de vivo, eĉ de la travivoj de homoj en la Sankta Biblio, konfirmas ke sufero estas neevitebla. Kiam sufero okazas, oni eble kulpigas sin se oni vidus klare la ligon inter la kaŭzo kaj rezulto de sia ago kaj la konsekvencoj; oni eble kulpigas aliajn homojn, influojn, aŭ la diablon; kaj oni eble kulpigas Dion pro sia sufero ĉar oni kredas ke Dio estas kapabla fari ĉion kaj povas haltigi ian malbonon. Se ĉi tiu tria eblo okazus, tiam, oni eble estas kolera kontraŭ Dio, kaj oni devas pardoni Dion ĉar "por koleri kaj ofendiĝi kontraŭ iu, ne menciante Dion, havas spiritajn, emociajn, fizikajn kaj sociajn konsekvencojn."

La problemo de malbono kaj suferado jam igis multajn homojn malkaŝe nei la ekzistadon de Dio. Tiuj, kiuj ankoraŭ kredas ke Li ekzistas, malfacile kredas ke ĉiopova, ama kaj bonkora Dio permesas malbonon aŭ suferon okazi al Siaj infanoj. Kial Li ne haltigis la malbonon? Kial Li ankoraŭ permesas la diablon, la ĉefan malamikon, fari lian malbonon? Ĉi tio igas multajn homojn esti koleraj kun Dio. Ili devas pardoni Dion ĉar "Dio ne ĉiam faras tion kion homoj volas ke Li faru nek Li faras ĝin kiam ili volas ke Li faru ĝin, ne menciante farante ĝin kiel ili volas ke Li faru ĝin."

Esti kolera, eĉ kun Dio, ne estas peko. Tamen, oni ne devas permesi onian koleron konduki al peko. Apostolo Paŭlo admonis, "Koleru kaj ne peku, la suno ne subiru sur via kolero; ankaŭ ne donu lokon al la diablo" (Efesanoj 4,26–27). Multaj homoj estis koleraj kun Dio en la Sankta Biblio. Moseo estis kolera kun Dio kiam lia unua peto al faraono pri la izraelidoj ne sukcesis (Eliro 5,20–23). La popolo izraela estis kolera kun Dio multfoje kvankam ili lasis sian koleron konduki ilin al peko (Nombroj 21,5). La kolero de Naomi estas klasika (Rut 1,19–21). Imagu kiel Maria kaj Marta sentis dum ili rigardis sian amatan fraton, Lazaron, suferigita de malsano ĝis morto eĉ post kiam ili sendis mesaĝon al Jesuo por veni kaj resanigi lin (Johano 11). Ili ambaŭ preskaŭ diris la samajn vortojn kiam Jesuo finfine venis post kiam Lazaro jam estis

entombigita dum kvar tagoj (kp. Johano 11,21 kaj 32).

Nu, ni scias la finon de ĉiu el tiuj okazoj menciitaj supre. Kiel ankaŭ vi estas kolera kun Dio? Estas kvin kialoj kial homoj koleras kun Dio.

**Kialo unua**: oni eble pensas ke la puno kiun oni havas pro sia nefaro troe superas la nefaron. Kain estis bona ekzemplo de ĉi tio (Genezo 4).

**Kialo dua**: oni eble pensas ke oni ne havas justan trakton aŭ rekompencon de Dio aŭ iu ajn homo/institucio pro siaj bonaj faroj. La pli maljuna frato je la parabolo de la erarinta filo (Luko 15,25–32) kaj la laborantoj je la Parabolo de la laborantoj en la vinberejo (Mateo 20,1–16) elmontris ĉi tion.

**Kialo tria**: oni eble estas kolera kun Dio se oni havus "blokitajn" celojn aŭ neatingitajn dezirojn. Oni eble jam servis Dion kun la espero ke Li faros oniajn dezirojn kaj helpos onin atingi oniajn celojn. Tamen, iu fakto de vivo estas jene: "Ni ne kutime akiras tion kion ni meritas aŭ volas je vivo." Ĉi tio eble estas pro ne estante je la planoj kaj celoj de Dio por onia vivo, aŭ pro neĝustaj/egoismaj deziroj. Jakobo klarigis ĉi tion je sia epistolo (4,3). Oni devas ĉiam memori tiun deklaron de la Eternulo je Jesaja 55,8–9, "Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj.... Kiom la ĉielo estas pli alte ol la tero, tiom Miaj vojoj estas pli alte ol viaj vojoj, kaj Miaj pensoj ol viaj pensoj."

**Kialo kvara**: oni eble havas, precipe teruran, malsanon kaj heredajn kondiĉojn kiuj estas alfrontoj de vivo. Tia "homo tiel afrontita kaj afliktita pensas tiel senhelpa kaj iam estas kolera kun Dio pro sia aflikto." Kelkfoje, Dio ja glorigas Sin je tiaj afliktoj.

**Kialo kvina**: Dio eble intence permesas al Satano kaŭzi malfacilaĵon al homo, aŭ Li eble permesas tion kio povas esti aludita kiel "agoj de Dio" (okazoj kiuj estas preta homa rego) okazoj kiuj igas homojn esti koleraj kun Dio. Ijob estas klasika ekzemplo ĉi tie, kaj li elmontris sian koleron al Dio. Dum mi intence ne uzas iun el la realaj okazaĵoj kiujn d-ro Deegbe uzis je sia libro por ilustri siajn argumentojn, mi uzu ĉi tion kio okazis al iu intima virino antaŭ kelkaj tagoj. Ŝi planis sian edzan ceremonion pasintan semajnfinon, kaj la estonta edzo mortis mistere du tagojn antaŭ la tago de la edza ceremonio. Ĝi estas tiel doloriga. Kial Dio permesis tion?

Ĉu vi estis, aŭ estas je iu ajn el ĉi tiuj situacioj? Kiel vi pensis, aŭ pensas pro tia situacio? Kiel vi traktis, aŭ traktas la situacion? Ĉu la situacio igis aŭ igas vin esti kolera kontraŭ vi mem, aliaj homoj ĉe vi, aŭ eĉ kontraŭ Dio? Kiel vi devas trakti vian koleron en iu el ĉi tiuj situacioj? Tio jam estis konfirmita frue ke kolero estas parto de homo. Tamen, "Konsilistoj jam notis ke estas kvar manieroj de trakto de kolero. Tri estas nebonaj: subpremo de kolero, malkaŝa atako kaj pasiva atako. La kvara kiu estas la plej bona estas esprimo de kolero."

Oni povas subpremi sian koleron kiam oni rifuzas aŭ hezitas akcepti ke oni estas kolera. Tia homo ne volus ke aliaj homoj sciu ke li estas kolera. Eĉ,

kiam estas evidente ke li jam estas kolerigita, li pretendas kvazaŭ nenio okazis. Tiaj homoj estas danĝeraj kaj ili reale ne amas sin.

Oni povas esprimi sian koleron je ataka maniero. Tia persono inklinas malkaŝe kritiki, insulti, batali, aŭ/kaj priklaĉi la personon kun kiu li estas kolera. Se la persono estus kolera pri Dio, li eble neus la ekziston, potencon de Dio, aŭ ĉesus servi Lin. Tia persono ja devas pardoni Dion!

Homoj kiuj pasive ekpremas sian atakon eble estas silentaj kaj transigas tian atakon al alia persono. Tiaj homoj estas "serpento sub herbo." David estis kolera kun Dio pro mortigo de Uza, sed li transigis sian koleron nerekte al Obed-Edom (vidu: 2 Samuel 6).

Oni tamen povas esprimi sian koleron je bona maniero se "la kolero estus direktita al nefaro aŭ ago. Ĉi-kaze, la prava aŭ justa kolero estas disciplinita kaj sub rego." Ĉi tiu speco de esprimo estas celeca kaj klopodas korekti malbonan situacion. Jesuo Kristo montris ĉi tion kiam li elpelis la homojn kiuj vendis kaj aĉetis en la templo (vidu: Johano 2,14-16). Tamen, estas kelkaj ekzemploj je la Malnova Testamento de homoj kiuj esprimis sian koleron kontraŭ Dio kiam ili pensis ke Dio faris erare. Jona estas klasika ekzemplo (vidu: Jona 4).

En ĉiu ajn kazo, la maniero laŭ kiu oni spektas vivon determinas la manieron en kiu oni esprimas sian koleron. Se oni konsentas ke vivo mem estas testo kaj laŭ Rick Warren, Dio testas nian kredon, karakteron, obeon, amon, kaj lojalecon per multaj el la cirkonstancoj kiujn ni alfrontas ĉiutage kaj la elekto kiun ni faras," tiam eĉ se oni estus kolera kun Dio, oni facile pardonas Dion kaj serĉas tion kion Dio volas elporti el la testo de vivo ĉu ĝi estas neproporcia puno, ŝajna maljusto, blokitaj celoj aŭ neatingitaj deziroj, agoj de Satano, aŭ eĉ "agoj de Dio."

Kiel vi traktas vian koleron? Ĉu vi pretendas kvazaŭ vi ne estas kolera, ĉu vi transigas ĝin al alia persono, ĉu vi malkaŝe kaj atake esprimas ĝin, aŭ ĉu vi bone kaj celece esprimas ĝi por pravigi la malpravaĵon?

Du tre gravaj doktrinoj – la providenco de Dio kaj la suvereno de Dio – ebligos nin plue havi perspektivon pri niaj vivoj kaj cirkonstancoj kaj finfine pardoni Dion. Ĉi tio igos onin kompreni plie la rimedojn per kiuj Dio traktas la homojn, kaj ĝi determinos ĉu Dio reale bezonas la pardonon de homoj aŭ ne.

> "Oni tamen povas esprimi sian koleron je bona maniero se "la kolero estus direktita al nefaro aŭ ago. Ĉi-kaze, la prava aŭ justa kolero estas disciplinita kaj sub rego.

Estas evidente el la Sankta Biblio kaj homaj travivaĵoj ke Dio estas fidela kaj efika je prizorgo de Sia kreitaro kaj je gvido de Sia popolo kie ajn ili iras laŭ Liaj celoj kaj planoj por ĉiu persono. Homo kaj ia ajn kreitaĵo estas kiel argilo dum Li estas la granda Potisto kiu formas la argilon laŭ Sia gusto. Li scias

ĉion. Li havas kialon por Sia permeso de io ajn kio okazas al Sia popolo. Oni eble ne scias nuntempe, sed oni eble scios poste. Tamen, estas certe ke ĉio estos evidenta je la fino de la mondo. Tial, oni ne devas zorgi pri la alfrontoj de vivo. Dio scias kiel Li traktos ilin por ni. Tamen, se Li ne traktus ilin je la maniero kiun ni volas, ni devas scii ke Li havas pli bonan (kvankam nekonatan) planon por ni.

Proksime al la providenco de Dio estas Lia suvereneco. "Ĉi tiu doktrino instruas ke Dio estas la Sinjoro de la kreitaĵo, la fonto de ĉio, kiu estigis la mondon kaj kiu gvidas Siajn kreitaĵojn al signifa fino kiel Li intencis ĝin." Kiam ajn ia malbonaĵo okazas, ĝi eble estas pro la ago aŭ neago de iu. Tamen, estas kelkaj malbonaĵoj kiuj estas preter la homa penso. Kio ajn okazas, oni devas scii ke estas Dio kiu regas la universon. Konsentite, ĉi tio jam igis multajn homojn esti koleraj kun Dio. Se Li regus, kial Li permesis al tia malbonaĵo okazi? Sed, multfoje, Li permesas al malbonaĵoj okazi pro pli bona celo por ni kaj aliaj homoj ĉe ni. "La historio de Jozef en Genezo 37–50 estas ekzemplo de la montro de la suvereneco de Dio. Ĝi montras laŭdindan sintenon je la tempo de malfeliĉaĵo, suferado, kaj maljusto."

Je la fino de la historio, li diris al siaj fratoj (kiuj estis la unuaj kreintoj de liaj malfeliĉaĵoj, "Vi intencis fari al mi malbonon; sed Dio aranĝis de tio bonon, por fari tiel, kiel nun estas, por konservi la vivon de multe da homoj" (Genezo 50,20). Kiel kristanoj, ni devas esti pretaj je ĉiuj malgrandaĵoj kiuj okazas al ni je fido sciante ke ĝi estas parto de la pli grandaj kaj pli bonaj planoj de Dio por niaj vivoj. Jesuo Kristo estis maljuste krucumita dum fifama rabisto estis malliberigita, sed la morto kaj releviĝo de Jesuo Kristo alportis la savon de iu ajn kiu akceptas Lin kiel personan Savinton kaj Sinjoron.

Se Dio, je Sia providenco kaj suvereneco, donus la plej grandan bonon por Siaj kreitaĵoj eĉ kiam ŝajnas ke malbono superas, neniu homo devas esti kolera kun Li pro ia ajn kialo ne menciante pardonante Lin pro Lia ago aŭ neago. Por diri ke ni devas pardoni Dion estas kiel blasfemo. Tamen, kiel ni rilatas kun Li kiam ŝajnas ke Li ofendas nin per tio kio okazas al ni?

> "La multaj terminoj de la Sankta Biblio tradukitaj en aliaj lingvoj kiel 'pardoni' montras kolekton de signifoj: por formeti aŭ forĵeti pekojn; por savi, por purigi, por savi aŭ liberigi pekulon."

Por diri ke ekzistas nenia malbono aŭ alfrontoj de vivo estas kiel kaŝiĝo malantaŭ fingroj. Por diri ke homoj ne estas koleraj kun Dio kiam tia malbono aŭ afronto de vivo okazas estas eĉ pli malbona. Homoj ja estas koleraj kun Dio, eĉ la plej religiaj aŭ spiritemaj homoj, kiam ili estas alfrontitaj per neplaĉa flanko de vivo. La plej granda bonaĵo estas konfesi ĉi tiun fakton kaj "pardoni" Dion. "Se vi kolerus kontraŭ Dio kaj ne konfesus ĝin, vi estas tiu kiu suferas." Malgraŭ la fakto ke Dio ne

faris ion ajn malbonan kaj Li ne bezonas nian pardonon kiel ni bezonas la Lian. Tamen, ĉar ni traktas Lin kvazaŭ Li ofendas nin, ni devas fari la sekvojn.

“La multaj terminoj de la Sankta Biblio tradukitaj en aliaj lingvoj kiel ‘pardoni’ montras kolekton de signifoj: por formeti aŭ forĵeti pekojn; por savi, por purigi, por savi aŭ liberigi pekulon.” Por “pardoni” Dion signifas por esti pacigita kun Li per la formeto de la bariloj kiuj disigas nin de Li, precipe fidante Lin pro Tiu kiu Li estas.

La unua barilo estas la barilo de silento. Ne restu silenta kiam vi travivas ian ajn alfronton de vivo. Diru ĝin al Dio. Esprimu al Li kiel vi sentas pri ĝi, kaj petu al Li por helpi al vi trapasi tra la situacio sukcese.

La dua barilo estas la barilo de akreco. “Ĉi tio estas eble la plej malfacila barilo formetota, por ĝi necesas ke ni konfesu ke ni reale estas akraj al Dio. Ĉi tio estas malfacila por multaj el ni, ĉar kiu volas konfesi ke li havas la aŭdacon havi domaĝon kontraŭ Dio?” Tamen, konfesu ke vi estas akra pri la situacio kaj lasu Dion scii kiel akra vi estas.

Alia barilo estas tio de nedankemo. Multaj el la homoj kiuj estas koleraj kun Dio neniam pensas pri la boneco de Dio en iliaj vivoj. Ili ne konsideras Dion kiam vivo estas plaĉa. Ili konsideras la bonaĵojn de vivo kiel normalaĵojn. Tamen, kiam ili estas alfrontitaj per la alia flanko de vivo, ili ekdubas la ekziston kaj potencon de Dio. Se dankemo al Dio jam estus nia vivostilo, estus malfacile esti kolera kun Li eĉ kiam ŝajnas ke Li ne zorgas pri tio kio okazas al ni. Tiu himna verkisto diris, “Kalkulu viajn benojn unu post unu, kaj vi estos surprizita pri tio kion la Eternulo jam faris.” Efektive, multaj el la famaj himnoj estis verkitaj de homoj kiuj havis kialojn esti koleraj kun Dio pro iliaj akraj alfrontoj de vivo, sed ĉar ili ne estis blokitaj per barilo de nedankemo, ili povis verki inspirajn himnojn kiuj ankoraŭ gloras Dion nuntempe.

Konklude, kiam Dio donas al vi malfacilan instruiston, asignon, aŭ problemon por trakti, Li volas ke vi fidu al Li kaj pasigu bonkvalitan tempon kun Li. Vi ne devas esti kolera kun Li aŭ havi domaĝon kontraŭ Li. Li helpos al vi tra la alfrontoj de vivo, kaj vi baldaŭ atestos pri Lia boneco je la nomo de Jesuo. Amen.

---

**PS** Se vi komprenas la anglan, vi povas sendi vian reagojn rekte al pastoro d-ro Fred Deegbe per lia retadreso fdeegbe@gmail.com. D-ro Deegbe estas edukita konsilanto kaj ordinita pastoro de la konfesio de la ganaaj baptistoj. (Li ne komprenas Esperanton!) Alie, vi povas sendi viajn reagojn al mi ĉe spiritualdigest@yahoo.com. Mi povos sendi la anglan elektronikan kopion de la libro al vi se vi bezonus ĝin. Dio benu vin!

Paiva Netto, José de: *Meditadoj el la Animo,* esperantigis Paŭlo Sergio Viena, 256 p. San-Paŭlo 2011

# Splitoj el saĝo kaj klero

Recenzas Raita Pyhälä "Saliko", FI

Kiam oni eklegas la libron, oni kvazaŭ komencas diskuti kun la aŭtoro. Pripensante liajn aforismojn kaj citaĵojn el la spirita, religia, filozofia, arta heredaĵoj de la homaro, oni pesadas siajn proprajn opiniojn kaj fidon - aŭ mankon de fido. Meditante li meditigas la leganton pri ekumenismo, paco, amo, edukado, la sorto de la homo kaj mondo. Ekde sia junaĝo Paiva Netto okupiĝas pri tiuj temoj sed ankaŭ pri politiko, ekonomiko kaj helpado al malhavuloj. Lia klero baziĝas sur longa vivo (sepdeko da jaroj) kaj sur impona legiteco. Imponaj estas ankaŭ liaj meritoj en la publika vivo de Brazilo, en muziko, poezio, radio kaj aliaj amaskomunikiloj, ne paroli pri lia agado en la Legio de Bona Volo. Pri ĉio tio nebrazilanoj bedaŭrinde malmulte scias.

Paiva Netto montras konvinkiĝon, ke la homo ne estas nur sekso kaj stomako kaj ke en ni staras eterna spirito. Ĉio devenas el spirito. Idealisto li estas, sed kun kompetenco kaj talento. Li montras ankaŭ sian verkistan stilon kaj sian guston pri pentroarto. En la libro videblas verkoj de famaj pentristoj, kiaj Cezanne, van Eyck, van Gogh, Gainsborough, Kokochka, Seurat, Signac, Vermeer, tamen nur kiel brunetaj modestaj reproduktaĵoj sen la originalaj koloroj, kiuj ja igus la libron tro multekosta. La tekstopaĝojn ofte ornamas oranĝaj dekoracioj kaj ili lasas sufiĉe da spaco por malgrandaj seriozaj asertoj. Kelkfoje la ofta uzado de majuskloj iom ĝenas (ne anglalingvan) leganton, kiu ne kutimiĝis al tio. Du citaĵoj:

- Unu el la danĝeroj, kiujn la Homaro trapasas, estas vulgarigo de sufero.
- Solidareco estu lumo, kiu malfermas novajn vojojn inter la ombroj de avido.

La listo de fontolibroj enhavas kvardekon da titoloj, kaj laŭlonge de la paĝoj estas citataj pli ol 180 pensuloj, filozofoj, religiuloj kaj verkistoj. Pri ĉiu citata homo la aŭtoro provizas nin per la bazaj sciigoj per utilaj notoj.

Sur la komencaj paĝoj la libron kaj la aŭtoron prezentas la fama reĝisoro Roman Dobrzyński. Sur paĝo 11 legeblas nur unu frazo: "Ĉio forpaŝas, nur Jesuo restas!" Sur la finaj paĝoj oni trovas Patro Nian kaj citaĵojn el la prediko de Jesuo sur la monto.

Pli ol 400000 ekzempleroj de la libro jam estas venditaj.

# Bibliaj Tagoj 2012 en Trento

## Interesaj Tagoj en la urbo de Trenta Koncilio 1545-1563

Raportas Karl Heinz SCHAEFFER, DE

Inter la 7a ĝis 11a de Marto okazis la nunjaraj Bibliaj Tagoj en Trento laŭ la invito de lokaj esperantistoj en la Sanktejo Madonna delle Laste. Alvenis 23 partoprenantoj el la 5 landoj Ĉeĥujo, Germanujo, Kroatujo, Italujo kaj Slovakujo. La programo enhavis kaj bibliajn studojn, kaj preskaŭ ĉiutage kantojn surbaze de nia ADORU, kaj ekskursojn al la urbo Trento mem kaj ties ĉirkaŭaĵo ĝis eĉ al la Lago de Garda en ŭrbo Riva.

La spiritan gvidadon faris patro Willibald Kuhnigk OSB el la monaĥejo Nütschau apud Hamburgo, kiu en tiu ĉi jaro traktis precipe la okan ĉapitron de la Epistolo al la Romanoj de Apostolo Paŭlo. La kantekzercojn gvidis Stefan Lepping, orgenisto el urbo Werl/ Germanujo.



La dioceza muzeo en Trento

La alvojaĝintoj estis bone traktataj en la monaĥejo mem, oni dormis bone, manĝis bone kaj ĝuis la proprajn ĉambrojn kaj la aliajn ofertojn de la domo kiel kapelo, seminariejo aŭ la parksimilaj ĝardenoj ĉirkaŭ la konstruaĵoj.

Krom la bibliaj studoj la urbo Trento estis de komuna intereso pro tio, ĉar en la jaro 1545 komenciĝis tie la Koncilio de Trento aŭ Trenta Koncilio, kiu estis la triaantaŭlasta ekumena koncilio de la katolika eklezio, malfermita de la tiama papo Paŭlo la 3a. Per tiu Koncilio estis difinita la reformo de la eklezio (katolika reformacio) kaj precizigitaj la kredreguloj kontraŭ la doktrino de kalvinismo kaj luteranismo (Protestanta Reformacio).

Bedaŭrinde la koncilio ne sukcesis restarigi eklezian unuecon kun la reformacio. Tamen, Trento tute ne estas nur simbolo por disiĝo aŭ disbrakiĝo. Post la dua Vatikana koncilio Papo Paŭlo la VI-a diris al la dioceso de Trento, ke speciale ĝi nun malfermu sin kaj klopodu por unueco inter la eklezioj.

En Trento estiĝis renoma ekumena Centro Bernardo Clesio. La Centro montras rimarkindajn rilatojn al diversaj eklezioj protestantaj kaj ortodoksaj tutmonde. Sekve estiĝis en la Dioceso

de Trento en la pasintaj jardekoj ankaŭ kristanaj komunumoj de aliaj konfesioj ol la katolika. Du el ili la grupo vizitis vendrede kaj sabate, unu evangelianan kaj unu ortodoksan. Okazis kun ties estroj diservo resp. edifa preĝado, por iomete sperti ilian manieron celebri la mesaĝon de la Biblio.

Ekskursante tra Trento ni vizitis la ĉarman urbokernon, la koncilian katedralon, la diocesan muzeon kaj vespere ni preĝis komune la vespron en la preĝejo de Sankta Lorenco.

Unu tagon poste ni atingis antaŭtagmeze la Ekumenan Centron kaj aŭdis la historion de la Ekumena Centro fare de s-ro Martelli, la afergvidanto kaj ni konatiĝis kun la episkopa anstataŭanto tie. Posttagmeze sekvis busekskurso unue al urbo Arco, kie ni havis plenan evangelian diservon kun la loka germana pastro. Ties predikon majstre tradukis preskaŭ simultane Stefan Lepping. Poste okazis pluveturo al urbeto Riva ĉe la Garda Lago.

La alian tagon ni buse veturis al la najbara urbo Rovereto, kie troviĝas impona Sonorilo por la Paco, kun aleo de flagoj de ĉiuj nacioj de la mondo, kaj najbaran klerigan Centron, kiu montris draste la terurajn sekvojn de militado niatempe kaj la bezonon de interpaciĝo.

Poste ni renkontis la popon de ortodoksa preĝejo en Rovereto. Li benis nin per kantita beno kun du kantistinoj, kiuj asistis lin en ortodoksaj himnoj en la lingvoj rusa (praslava), rumana kaj itala. Ni ĉiuj estis aldone benitaj per sankta oleo, tenante kandelojn en niaj manoj. Ni montris nian dankon pere de ortodoksa himno el ADORU, kiun ni Esperante kantis komune kun popo kaj kantistinoj. Do montriĝis, kiom bona nia ADORU estas – vere ekumene uzebla.

Bedaŭrinde estis, ke nur malmultaj evangelianoj partoprenis. Ili preterlasis interesajn tagojn en vere ekumena etoso. Mi volas instigi ĉiujn, partopreni en la venontaj Bibliaj Tagoj, kiuj post Münster kaj Werl ĉiam meritis kunan vivadon en ekumena gefrateco.



La grupo dum la bibliaj tagoj en Trento



Sonorilo de la Paco



Komuna kantado kun ortodoksuloj



Katedralo en Trento

# Henk de Hoog – Andreo Cseh 4

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

*La dua mondmilito finiĝis en Nederlando la 5-an de majo 1945. Tio ne signifis, ke la tuta lando estis liberigita. Aliancaj trupoj de angloj kaj kanadanoj restis por forigi la lastajn nestojn de nazia rezisto. Ekzemple sur la insuloj Ameland kaj Schiermonnikoog germanaj soldatoj regis ĝis meze de junio. Tiam ili estis kaptitaj de la kanadanoj.*

*Intertempe Andreo Cseh daŭrigis la konstruadon de Universala Ligo (UL).Tiu ĉi organizaĵo celis la federigon de la mondo, uzante Esperanton.*

*Diferencas la karakteroj de De Hoog kaj Cseh. De Hoog laboras por neniigi la malbonon kaj Cseh laboras por akceli la bonon.*

Amsterdam, 1945-08-12
Al s-ro A. Cseh,

Antaŭ 2 semajnoj mi legis en The Liberator, angla semajna gazeto "for members of the allied forces" artikolon pri "Basic English" verkitan laŭ peto de multaj nederlandaj abonantoj. La gazeto estas vere tre disvastigita inter la intelektularo de Amsterdam, ĉar ĝi estas la sola angla gazeto, kiu estas regule havebla. La soldatoj estas preskaŭ nenie vidataj sen The Liberator.

Mi skribis, responde al la artikolo, leteron. Nun mi ricevas ilian respondon kaj peton pri pli longa artikolo. La afero ŝajnas al mi iom grava. Mi estas preta verki petitan artikolon mem, sed se vi juĝas la aferon tiom grava, ke laŭ via opinio novulo sur la ĵurnalista kampo kiel mi ne estas la ĝusta persono, mi volonte lasas la taskon al pli kompetenta persono.

Pardonu mian arogantecon en la titolo [de mia sendita letero] "reprezentanto de la Internacia Esperanto Instituto". Mi konscias plene, ke ĝi ne ekzistas, sed mi juĝas grava, iom imponi ilin. Internacia Instituto estas pli peza ol privata persono.

En Heroldo de Esperanto numeroj 50 kaj 51 de 1933 troviĝas kritiko pri "Basic English" de s-ro M.C. Butler. Ĉu vi povus sendi ilin al mi prunte. Mia intenco estas verki la artikolon tiel, ke ĝi ne nur estas pseŭdo-scienca seka traktaĵo, sed forta propagando por Esperanto.

"Basic English" estas nia plej grava kontraŭulo kaj la disreviĝo, kiun ĝi nepre trenos post ĝi, estos por la afero en ĝeneralo verŝajne same katastrofa kiel la Volapüka heredaĵo. Ni do ataku ĝin. Ĉiu materialo por mia arsenalo estos bonvena.

via samideano, **H. de Hoog**

Hago, 1945-08-15
Al s-ro H. De Hoog

Ĉi tie mi sendas la 2 Heroldo-numerojn kun la artikolo pri Basiko. Ĉar la numeroj estas parto de grava kolekto, mi petas bone trakti ilin kaj post uzo baldaŭ resendi.

Via klopodo ĉe The Liberator estas bonega kaj tre laŭdinda. Ke vi prezentis vin kiel reprezentanto de la Int. Esp. Instituto, estis tute saĝa kaj vi prave supozis nian konsenton. En similaj okazoj vi povos ĉiam agi same.

Vi povas mencii en via artikolo, ke la nederlandanoj volonte lernas la anglan lingvon, sed ili preferas tiam lerni la veran kaj ne iun ridindan fuŝaĵon.

La anglaj esperantistoj unuanime asertas, ke ili tre malŝatas Basikon kiel malbelan kriplaĵon de la bela angla lingvo. Do vi povas trankvile diri en via artikolo, ke viaj anglaj konatoj kaj amikoj mem kondamnas Basikon. El taktika vidpunkto vi bone faros, se vi laŭdos la veran anglan lingvon, sed bedaŭros, ke ĝi ne havas ŝancon fariĝi oficiala mondlingvo pro la interpopola ĵaluzo. Tial necesas neŭtrala lingvo, kaj ĝi jam ekzistas: Esperanto.

Nu, tamen ne indas perdi tro multe da tempo pro ĉi tiuj kontraŭuloj. Nia ĉefa argumento estas la faktoj, kiujn ni produktas. Tial ni diligente konstruadu nian movadon kaj kreadu senĉese novajn konkretaĵojn! Nur per tiuj ni povos gajni la batalon! Nia Universala Ligo estos en tiu batalo la plej potenca faktoro.

Kun ligana saluto, **A. Cseh**

Hago, 1945-08-25
Al s-ro H. De Hoog,

Ĵus mi ricevis el Belgujo ĉi tiujn 3 numerojn de Flandra Esperantisto. Mi rapidas sendi ilin al vi, ĉar ili ĉiuj entenas interesajn artikolojn pri Basiko kun informoj, kiujn vi bone povas uzi en via batalado kontraŭ tiu stultaĵo. Eble vi jam estas preta kun via artikolo por The Liberator. Tiam vi povus fari novan artikolon duan, aŭ artikolon por alia gazeto.

Sabate, la 1-an de septembro posttagmeze je la 14.30 horo ni havos kunvenon de ĉiuj UL-komitatanoj kaj kore invitas ankaŭ vin. Mi invitas kaj esperas bonvenigi ankaŭ komitatanojn el Utrekto, Roterdamo, Lejdeno kaj Dordrekto. Ĝi estus do nia unua komuna kunveno.

Ĉi tie mi sendas la novan statistikon kaj kelkajn ciklostile multobligitajn varbilojn. Mi esperas, ke vi povos varbi ankoraŭ kelkajn membrojn, por ke nia statistiko kresku.

Kun koraj bondeziroj, **A. Cseh**

# Kristanaj sektoj multnaskiĝas en Kongo

Arlain Kizeyidioko Mayinda, Kongo

Dum la lasta tempo ni spertas sur religia kampo kuriozan fenomenon en la Demokrata Respubliko Kongo. Sektoj kristan-originaj multope naskiĝadas tra la tuta lando. Ĉu tio estas la apogeo de la kristanismo aŭ simple la plenumiĝo de la Evangelio de Jesuo Kristo?

Anstataŭ prediki konvertiĝon aŭ pentofaradon cele al tio, ke la kredantoj havu decan konduton, la plimulto el tiuj sektoj promesplene instruas la prosperon: oni malavare oferdonu por multe ricevi! Ĉar tiu kiu manplene dissemis, ankaŭ abunde rikoltos.


Kio kaŭzas ke tiuj misuzantoj de la Evangelio gajnas tiom da tereno, kaj per kio iliaj sektoj tiel disnaskiĝas kiel fungoj? Sufiĉas nur ke oni estu elokventa kaj parkere sciu kelke da bibliaj tekstoj por povi proklami sin predikanto, pastoro, evangeliisto, ktp.

Tiuj falsaj profetoj estas ruzaj; ili havas genian manieron allogi fidelulojn, elverŝante saĝe elektitajn vortojn por altiri al si la simpation de publiko ilin aŭskultanta.

En la Sankta Biblio ni legas ”Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj, kiuj venas al vi en ŝafaj feloj, sed interne estas rabemaj lupoj. Per iliaj fruktoj vi konos ilin” (Mateo 7, 15–16).

Kial tiuj falsaj profetoj havas tiom grandan influon en nia socio? Komprenu, ke la social-ekonomia situacio de nia lando havas plej malaltan nivelon. Kaj ju pli tiu situacio akriĝas, des pli la popolo bezonas ion kio povas mildigi ĝian suferadon: homoj tiam serĉas konsolon kaj sekve turnas sin al la Evangelio de Jesuo Kristo. Tio ne estas malbona; malbone estas ke malicintencaj personoj avidaj kaj monsoifaj misuzas la Evangelion por malriĉigi siajn gefratojn. Tiuj misgvidaj pastoroj instruas bonstaton kaj prosperon, por ke iliaj ŝafoj nepre amase kontribuu al la korbo por monkolektado kaj, konsekvence, Dio al ili senlime rekompencu. Krome, dum la popolo havas grandajn financajn zorgojn por vivteni sin, tiuj trompuloj devigas ĝin alporti valoraĵojn kiel orajn objektojn, juvelojn kaj brutojn. Jesuo diras al ni, ke per iliaj fruktoj ni konos ilin!

Ho, kiom facile estas gajni monon



La aŭtoro

per homa ekspluatado! Sed estas ankaŭ falsaj profetoj, kiuj diboĉas kun virinoj kiuj frekventas diservojn. En Kinŝaso pastoro estis arestita pro grava krimo; li gravedigis junulinon kiu ofte vizitas lian preĝejon. Kaj por ke la afero ne konatiĝu en ekleziaj rondoj kaj protektiĝu lia reputacio, li ĉion faris por devigi la knabinon submetiĝi al aborto. Ĉar tiun aborton faris ĉarlatana kuracisto, la knabino mortis post unusemajna suferado. Bonŝance ŝi estis malkaŝinta la sekreton al ŝia patrino ankoraŭ antaŭ sia elmondiĝo. Post serioza esplorado la pastoro estis arestata sed la ĉarlatano sukcesis ĝustatempe forfuĝi.

Senlabora junulo kiu nur malfacile povas zorgi pri si mem ne povas sonĝi pri geedziĝo. Ne povante vivteni sin mem, kiamaniere li okupiĝu kaj responsu pri tuta familio? Ni rimarkas ke junulinoj amase venas en preĝejojn kun la celo trovi edzon. Tio estas malfacila en socio kiun karakterizas vasta senlaboreco. Junuloj ne povas edziĝi se ili ne havas salajritan okupon, ĉar la doto estas multekosta kaj fondi familion por ili do ne eblas. Kelkaj virinoj kiuj estas bonŝancaj povi edziniĝi sed ne kapablas naski infanon venas al la preĝejo, esperante kaj preĝante ke Dio al ili donu infanojn. Kiamaniere ili nasku infanon, kiam en junaj jaroj ili vizitis ĉarlatanon kiu kaŭzis nur grandan porĉiaman damaĝon, senscie, sensperte kaj fuŝe forprenante estiĝantan vivon?

Dio donas laboron, infanojn, prosperon ktp. al tiuj, kiuj Lin respekte obeas, bone kondutas, ĉion faras por esti en konstanta rilato kun Li. Sed ne al tiuj kiuj proksimiĝas al Li kun egoismaj interesoj. Pri tiuj aferoj la Biblio diras: ”Celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi” (Mateo 6, 33). Kelkaj junuloj venas en preĝejon precipe por ekhavi laboron kaj montri respondecon; tiam la eklezio faras sian eblon okupiĝi pri iliaj dompago, kuracado, edziĝdoto, ktp.

Mono estas la baza motivo, kiu ludas rolon en la multnaskiĝo de la sektoj. Al tio ni aldonu la mankon de scio kaj la specialan manieron en kiu oni eksplikas kaj interpretas la sanktajn librojn. En la havenurbo Matadio du pastoroj interbatalis dum dimanĉa diservo antaŭ la okuloj de la kredantoj. La asistanta pastoro enviis la ĉefpastron ĉar tiu lasta aĉetis ĵipon kvankam li jam havis bonkvalitan kaj prestiĝan aŭton. La asistanto deziris, ke la eklezio aĉetu ĵipon ankaŭ por li. Tio ne plaĉis al la ĉefo, kaj ĉio sekve finiĝis en batalo. Post kelkaj tagoj la asistanto foriris, prenante kun si multe da fideluloj. Por fondi novan eklezion! Jen en kiu maniero tiuj tiel nomataj preĝogrupoj obliĝas kaj disvastiĝas!

Estas ankaŭ ekzemploj de disiĝo, pro tio ke oni ne konsentas pri vorto el la Sankta Skribo. Unu opinio tekstas, ke Jesuo Kristo estas nur filo de homo, alia ke Li estas Dio mem. Aserti ke Li ne estas Dio la plej potenca, jen vera abomeno! Anstataŭ lernigi al senlaborulo kulturi la teron, multaj opinias ke estas bone preĝadi tage kaj nokte en preĝejoj, esperante ke Dio mildigos

ilian suferadon.

Kiam tiuj kompatinduloj rimarkas ke ili ne trovos kontentiĝon, ili ofte turnas sin al alia preĝogrupo, kredante ke ili trovos tion kion ili serĉas. Povas okazi ke sameklezia grupo da kredantoj havas komunan problemon; tiam ili povas facile kuniĝi por fondi novan eklezion. Tio estas pura religia vagabondeco!

Dio benis nian landon oferante al ĝi ĉiajn riĉaĵojn, kaj tamen oni diras ke Kongolando estas geologia skandalo. Nia tero estas tre fruktodona sed la popolo vivas en mallumo kaj mizero.

Vi ne konkludu, ke ĉiuj falsaj pastoroj estas elokventaj. Kelkaj havas eĉ ne minimuman instrunivelon. La plimulto el tiuj faris pakton kun la diablo kaj praktikas magian arton. De sia mastro, la diablo, ili akiris malefikan potencon kiu al ili faciligas faradon de mirakloj. Ĉar nia popolo estas naiva pro manko de scio, ĝi venas amasege al tiuj miraklofarantoj. Malriĉeco, senlaboreco, neinstruiteco kaj naiveco estas la ĉefaj faktoroj, kiuj kaŭzas la multnaskiĝemon de la sektoj.

Dio revoku kaj kompatu tiujn, kiuj misuzas la Evangelion pro malbonaj intencoj. Povas esti ke iamaniere ili pagos pro siaj misoj!

# Rememoroj al KELI kongreso 2011

Por mi KELI kongreso signifas: renkontiĝi kun karaj geamikoj. Multegaj ĉarmaj kontaktoj eblis ĉijare en Poděbrady, denove en favora loko kaj kongresejo. Dum la kongreso

- ni aŭdis imponajn prelegojn,
- ni ĝuis interesajn ekskursojn.
- ni promenis feliĉe en la bela banloko Poděbrady
- kaj speciale kortuŝis min la adiaŭa ceremonio por Jaques Tuinder.

Grandan dankon al Pavel Polnický, kiu entuziasme ĉion organizis kaj ebligis sukcesplenan kongreson al ni ĉiuj!

Kore salutas:
*Ruth van Puijenbroek*
Svislando



Pavel Polnický (maldekstre) gvidas dum la urba promenado.
Fotis Václav Pospíšil

# La tuniko en Treviro, vizitebleco




Karaj gesamideanoj, ekde la 13-a de aprilo ĝis la 13-a de majo 2012 ja okazos la malofta montrado de la "sankta tuniko" (Johano 19, 23), la plej valora trezoro de nia diocezo ĉi tie en Treviro, kaj la tiurilata pilgrimado (retpaĝaro, ĝis nun bedaŭrinde nur en la Germana: http://www.heilig-rock-wallfahrt.de).

La ĉefa celo de la pilgrimado estas helpi la ekumenon per la formo de tiel nomita "Kristo-Pilgrimado", kiun ankaŭ la evangelia eklezio oficiale aprobas. Mi aldonis germanan informilon pri la ekumena aspekto. Se vi planas viziti Treviron okaze de la pilgrimado unuope aŭ kune kun grupoj de viaj organizoj IKUE aŭ KELI, mi volonte pretas ĉiĉeroni aŭ helpi al vi iel ajn, ekz. trovi tranoktejojn, gvidi vin tra la urbo k.t.p. Bonvolu kontakti min ĝustatempe.




Elkore salutas vin,
D-ro Christoph Klawe

Pli da informo vi trovos ekzemple je:
http://de.wikipedia.org/wiki/Heiliger_Rock,
http://nl.wikipedia.org/wiki/Heilige_Rok,
http://fr.wikipedia.org/wiki/Sainte_Tunique_du_Christ)

# Kompletiga partoprenantlisto de la 62-a KELI kongreso

| | | | |
|---|---|---|---|
| 53. Nedev Nedko, | Bulgario | 56. Landfors Anna, | Svedio |
| 54. Schaap-Glas Elly, | Nederlando | 57. Landfors Mats, | Svedio |
| 55. Birta Sobolciu, | Rumanio | | |

# Esperantaj jubileoj en la diocezo Speyer

Raportas Franz-Georg RÖSSLER, DE

La 23an de oktobro 2011 la Laborunuiĝo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) en la diocezo Speyer festis per diservo en la Afra-kapelo de la katedralo samtempe tri jubileojn kun signifo ankaŭ por nekatolikoj. Antaŭ dudek jaroj la sacerdoto Albrecht Kronenberger invitis al la unua esperantlingva diservo en la katedralo en Speyer. De tiam ĝis hodiaŭ celebriĝis pojare kvin tiaj mesoj samaloke.

Iom pli poste fondiĝis la laborunuiĝo kun la celo realigi komunan religian vivon baze de du kulturoj, nome de la Kristaneco kaj de la Esperantaneco. Ĝis hodiaŭ aliĝis 365 personoj, ĉu aktive, ĉu subtene, inter ili ankaŭ protestantoj. La tria festinda dato estis la apero de la ekumena kanto- kaj preĝolibro "ADORU" antaŭ dek jaroj, al kies ekzisto la katolika sacerdoto Kronenberger kaj la evangelia pastro Adolf Burkhard konsiderinde kontribuis.

Rita Rössler-Buckel, la aktuala prezidantino de la asocio, dankis dum la festkunveno al siaj antaŭuloj Manfred Ritthaler, Helmut Rössler kaj Anton Kiefer (kiu malavare ankaŭ tiuokaze regalis la ĉeestantojn per sia altkvalita "Esperantovino"). Mallonge ŝi memorigis pri la agado de la asocio: Apud la regulaj diservoj en la katedralo de Speyer ŝi menciis interalie la paskonoktajn mesojn en la pilgrima kapelo de Maria Rosenberg ("rozomonto"), la informostandojn dum la diocezaj "Katolikaj tagoj", la MES-aranĝojn en la apudmozela Marienburg, la diservojn en aliaj Esperanto-kunvenoj kaj, tute aktuale, la interretan portalon "Kristanaj fontoj".

Al la diservo kaj la posta solenaĵo muzike kontribuis la ensemblo "Spira spiralo", en kiu membras Eberhard Cherdron, la antaŭa episkopo de la palatinata protestanta landa eklezio, kaj lia edzino. Kvankam ne plu regule per diservoj en la Afra-kapelo de la katedralo de Speyer, la laborunuiĝo ankaŭ estonte volas kontribui, ke homoj en komuna lingvo, en la lingvo de d-ro Zamenhof, renkontiĝu, kompreniĝu kaj preĝu transe de limoj landaj, kulturaj kaj religiaj.



La katedralo en Speyer


Post la jubilea diservo en la Afra-kapelo

(memore al la ĵus mortintaj membroj Helmut Rössler, ne plu en la bildo / la nekrologon vidu sur paĝo 23 ĉi-numere, kaj Manfred Magin, meze de la bildo)

---

# Gratulojn al nia 80-jarulino!




Iren Bagi, nia multjara peranto en Hungario kaj antaŭa estrarano de KELI, festis sian 80-jaran naskiĝtagon la 1-an de aprilo. En la nomo de KELI vizitis kaj gratulis ŝin Éva Farkas-Tatár, Ágnes Raczkevy-Eötvös kaj Bengt Olof Åradsson (fotis).

# Informetoj

## Antaŭ ne longe aperis de Gerrit Berveling

| | |
|---|---|
| Titolo | Antologio latina 4<br>Volumo 4: La arĝenta latina |
| Kategorio | Antologioj |
| Prezo | 21.30 €, sesona rabato ekde 3 ekz. |
| Eldonloko, jaro | Chapecó, 2012 |
| Eldoninto | Fonto |
| Tradukisto, lingvo | G. Berveling / Kompilis |
| Formato | 331 paĝoj, 20 cm |
| Recenzoj | Recenzoj mankas. |




## 65a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

La 14a ĝis 21a de julio 2012, Pécs (Hungario)

Aliĝilon vi trovos:
http://www.ikue.org/kong2012/index.htm

Pri Pécs en Esperanto kaj aliaj lingvoj:
http://eo.wikipedia.org/wiki/P%C3%A9cs

# Impona voĉo eksilentas

## Mortis engaĝiĝinta kristano kaj Esperantisto

La 20an de februaro mortis en Speyer (DE) **Helmut Rössler,** matematikisto, Esperantisto kaj atentema katoliko. Li naskiĝis en 1925 kaj poste elkreskis en la palatinata Sankt Martin, kie la gepatroj posedis vinbienon. Postmilite li deĵoris kiel matematikisto en lernejoj kaj la lerneja administrado. En tiu tereno li akiris grandan renomon. Lia kombinema spirito aparte ŝatis la ŝakoludadon. Tiubaze li ankaŭ traktis matematikajn problemojn kaj kreis multajn popularajn kalkulajn kaj lingvajn enigmojn. En malfruaj jaroj li en sia lasta loĝurbo gvidis senioran grupon "Gaja matematiko", en kies kadron li ludeme enkondukis Esperanton.

Aktiva kristano, li engaĝiĝis en diversaj paroĥoj kaj grupoj, aparte kiel membro de preĝejaj korusoj kaj laborante en diversaj funkcioj. Li konatiĝis en la diocezo Speyer pro sia kritikema observado de la interna disvolviĝo de la eklezio, kiun li per tiutemaj legantoleteroj en la dioceza gazeto "Der Pilger" [La pilgrimanto] akompanis, admonante kaj ŝanĝiĝojn instigante. Aparte li traktis la temojn sacerdoteco de virinoj, la rilato al divorcitoj kaj la ekumeno.

Esperantisto li fariĝis en 1955. Li komprenis la internacian lingvon ekumeno de lingvoj kaj kulturoj. Tuj li gvidis kursojn, prelegis, estis fakdelegito de UEA por matematiko kaj ties dumviva membro. Multe li verkis. Postrestas papere la tradukaj kontribuaĵoj al ADORU kaj, apud multaj dise aperintaj mallongaj tekstoj, la kuntradukita impona "Germana antologio". Inter 1992 kaj 1998 li estris la Laborunuiĝon de la katolika Esperanto-asocio (IKUE) en la diocezo Speyer, kun granda malfermiteco al aliaj kristanaj eklezioj. Dum 20 jaroj da regulaj esperantlingvaj diservoj en la katedralo de Speyer, li tie multe kontribuis kiel kantoro kaj lektoro. Ankoraŭ en la lastaj kunvenoj li sentis la bezonon, publike kantante kaj legante kontribui al la mesoj. Kun lia morto eksilentas voĉo kvazaŭ signala en la eklezio, la socio, la ekumeno.

Franz-Georg Rössler

# Gloro al Dio en la altoj

Versaĵoj de arkiepiskopo Johano la Sanfranciska (Ŝaĥovskoj)
Tradukis Larisa Kuzmenko el la rusa.

Ni aŭdas la infanbalbuton karan,
Similas ĝi al kanto de l'anĝeloj
Venintaj nokte al paŝtista aro
Kaj al la tuta mond' tra brilo de la steloj.

Rimarkas ni paŝtistan frat-konkordon,
Humilan klaron de simplul' diskreta,
Al la ĉiel' anĝelan kor-agordon
Kaj al feliĉ', naskita ĵus en la groteto.

Ni ekkomprenas fidon kaj toleron
De l'magoj, serĉaj pri la saĝo vera,
Kaj ree aŭdas ni plenigi teron
La kanton, kiun himnas la ĉielo.

Ho Di' transcenda kaj majeste glora,
Kreinto de la steloj, homoj, floroj!
Konsolon donas al la mond' angora
Alesto Via apud homaj koroj.

Vi vidas triston de l'teranoj: la malpovon
Akcepti, ami, serĉi, trovi Vin,
Kaj donas Vi al mond' la kanton animmovan,
Ĝi estas krono de la homdestin'.

Homeco Via sankta stele brilas,
Kaj mond' al sia granda am' aspiras,
Kaj kiu ĝin kun pio ekadmiras,
En la eterno ties kor' trankvilas.

Kaj ĉio pasos for – Kaj restos nur la gloro
De Via manifestiĝonta amo,
Humilajn Viajn sklavojn, ho Sinjoro,
Kontempli ĝin alvoku por ĉiamo.

Kaj for ne puŝu la veindan malfidelon
De l'eksamikoj, Vin lasintaj for,
Konservu, Di', al ili la esperon
Savitaj iĝi en la lasta hor'.